[noto] fonto: "budhana kuriero", n-ro 2518-2, 1975 (B.E. 2518)

La aŭtoro Franz Morawetz estis sekretario de BLE siatempe.

# *Toleremo*

**Franz Morawetz**, Danlando

Pri tiu vorto mi ne serĉis ekzemplojn, klarigojn aŭ rekomendojn en la sanktaj skriboj. Certe tie enestas multaj belaj kaj klaraj tekstoj, kiuj prezentas kaj prezentis tiun temon aŭ problemon en taŭga, plaĉa, komprenabla kaj dankinda maniero. Certe en tiu ĉi kajero aŭ en aliaj libroj troviĝas tiuj pli oficialaj tekstoj. Mi nur intencas prezenti miajn pensojn, kiuj ne baziĝas sur tiaj folozofiaj aŭ religiaj reguloj, sed kiuj devenas de mia vivado kaj spertado en la nuna mondo. Mi petas la leganton, kunpripensi la montritajn faktojn aŭ problemojn kaj trovi sian konstaton, sian decidon, eĉ se ĝi estas kontraŭa al la mia, aŭ, se tiu pripensa maniero ne estas plaĉa aŭ helpa, tion diri resp. skribi al la redaktoro. Bona kontakto inter la legantoj kaj la Budhana Kuriero ja estas la celo.

Pri la vorto toleremo mi rigardis unue la vortaron. En ĝi ja estas klarigoj, kion tiu vorto ĝenerala signifas. Verŝajne ĉiu leganto havas iun alian ideon pri la signifo aŭ la enhavo de tiu vorto, sed la ĝenerala signifo estu por ni ĉi tie valida.

Toleremo estas ia emo toleri. Sed kion oni emas? Laŭ la vortaro la senco estas, ke ekzistas aferoj aŭ io, kion oni ne aprobas aŭ kio malplaĉas, kio ĝenas aŭ eĉ suferigas, kaj kvankam oni iel kapablas malhelpi tion, oni ne kontraŭstaras al tiuj aŭ tiaj aferoj.

Mi supozas, ke estas klare por ni, kio tio povas esti, kion ni ne aprobas, kio estas malplaĉa, ĝena aŭ suferiga, kvankam tiu prijuĝo povas esti diversa laŭ la diversaj homoj.

La kontraŭstaro kontraŭ tiuj malplaĉaj aferoj povas esti iel aktiva, ke oni penas por malhelpi tion, aŭ nur simple preskaŭ pasiva kontraŭeco.

Kaj en la signifo de la vorto estas, ke ni kapablas malhelpi tion, do malfaciligi la aferon per diversaj kontraŭagoj aŭ eĉ malebligi ĝin. Ĉu ni vere ĉiam kapablas tion fari, do kontraŭi aŭ malebligi, mi dubas, sed en la senco de la vorto laŭ la vortaro tion oni ĝenerale pensas.

Por vidi, kion oni povas toleri aŭ kion oni eĉ toleru, necesas do mencii kelkajn faktojn, kelkajn farojn aŭ agojn, aferojn, mallonge do ion, kio estas neplaĉa, malplaĉa, ĝena, suferiga, kion ni resp. la unuopa homo ne aprobas. Eble la ordigita superrigardo estus pli taŭga, sed mi opinias, tio estas malfacila afero por mi, montri la tutan amplekson de tiaj aĵoj aŭ aferoj.

Mi simple komencas per ekzemploj el la familio. Verŝajne tion ĉiu povus mem sperti. Oni ja aŭdas ofte, ke ne ĉiam ĉio tie estas aprobita. La edzo eble havas alian opinion ol la edzino, aŭ la patro prezentas ion, kion la filo tiel ne aprobas. Aŭ la filo ion faras, kion la patrino ne aprobas. Tiuj faroj aŭ faktoj de nesamopiniado povas ja esti eĉ malplaĉa, kelkfoje oni ja tion aŭdas aŭ legas pri familioj, kelkfeje tio povas esti ĝena aŭ malagrabla por unu familiano, eĉ tio suferigas kaj havas pli da tiaj efikoj ĉe unu familiano.

Pri tio oni ja ĝenerale nenion diras, sed la leganto mem pripensu, ĉu li tiajn faktojn jam travivis. Pli detalajn tiajn ekzemplojn eblas prezenti, sed verŝajne ne necesas.

Mi enmetas ĉi tie ankaŭ la vorton ĉagreno, ĉagreniĝo, kaj tio ankaŭ okazas en la familia kontakto.

Aldoni mi ŝatas, ke oni ja povas senpartie tion rigardi, ĉar ĉiu flanko en la familio tion vidas de sia vidpunkto, de sia starpunkto. Ekzemple ekzistas diversaj ordoj en la mastrumado, diversaj kutimoj, unu tion tiel faras, alia aliel, li javas tiun ordon, ŝi alian. Ambaŭ ordoj estas bonaj ordoj, nur unu ne aprobas la alies ordon, la alies kutimon, kaj tio kaŭzas aŭ sekvigas kelkfoje jam ĉagrenon, tiun malplaĉon aŭ ĝenon.

Sed tiuj faktoj en la familio estas eble en la mondo ne tre signifaj, kvankam ili ja ankaŭ ekzistas. La valoron prijuĝu la leganto.

Eble pli klaraj aŭ pli facile kompreneblaj estas ekzemploj el la publika vivo de la socio. Ekzistas grupoj, kiuj agas kiel familigrupoj; ekzistas partioj, kiuj kiel tiaj grupoj aŭ aprobas aŭ ne aprobas la sintenon, la agadon de la aliaj partioj. Tiu neagnosko ja povas esti malplaĉa, eble ĝena, se ni rigardas ordonojn aŭ leĝojn de la ŝtato, por kelkaj ŝtatanoj, eble eĉ suferiga povas esti tia vivo en la ŝtato kun diversaj partioj. Sufiĉas eĉ unu partio, ke la ŝtatanoj ne estas kontentaj, ne aprobas tiujn malplaĉajn aŭ ĝenajn ordonojn aŭ agojn de la ŝtato.

Ankaŭ ĉi tie verŝajne ne necesas tuj montri pli detalajn ekzemplojn. Ĉiu leganto ja vivas en la ŝtato kaj aŭdas aŭ mem spertas, ke ne ĉio estas agrabla, kvankam pro kaj laŭ la ŝtata ideo ja necesas tiu ordo, ekzemple ke oni pagu impostojn. Kaj ne nur la vivado en la ŝtato kiel ŝtatano estu pritraktata; rigardu la grandajn grupojn de la "laboristoj" kaj de la "labordonantoj" en la "kapitalistaj" aŭ "demokratiaj" landoj. Ja estas grupo kontraŭ la alia, malplaĉa (aŭ ĉu plaĉa?), aŭ ĝene, ne agrabla. Mi ne intencas paroli por la unu aŭ por la alia flanko, mi nur ŝatas mencii tiun fakton ekzistantan, eble ne ĉie en la mondo.

Ni faru pluan paŝon ĉe niaj ekzemploj. Ne nur en la familio aŭ en grupoj, asocioj aŭ en la ŝtato ekzistas tiaj neaprobaĵoj (de unu flanko, la alia ja ĝin aprobas), kiuj estas malplaĉaj, ĝenaj aŭ eĉ suferigaj, sed ankaŭ la grandgrupoj de la ŝtatoj tiele agas unu kongraŭ la alia.

Unu ŝtatgrupo ekzemple estas "komunista", alia "kapitalista" aŭ "libermerkata". Unu grupo ne aprobas la alies sintenadon. Mi verŝajne tion iom modeste diras, ĉar

kelkfoje tiu neagnosko pluen iras al la malhelpo, al la malebligo por la alia flanko, kaj tio eblas plej ofte nur per potenco, per milito.

Tamen ankaŭ ĉi tie unu grupo havas sian ordon, sian idealan celon, same aŭ samgrade kiel la alia grupo. Tamen tiuj neaprobo kaj malebligo estas kelkfoje aŭ ofte suferigaj, kvankam ĉiu grupo ja havas sian bonan ideon - espereble.

La fakton de milito mi jam menciis. Ĝi estas unu el la plej fortaj tiaj faktoj.

Sed same kiel ĉiu ŝtato havas sian celon, sian vojon, tiel ja ankaŭ la diversaj religiaj (aŭ filozofiaj) grupoj havas sian celon, sian vojon. Kaj okazas ne malofte, aŭ fakte okazis, ke unu de tiuj religiaj grupoj ne aprobas la alies direkton, vojon, sintenon. Tio kelkfoje sekvigas malhelpon al la alia grupo, eĉ militsimilan agadon, kiu estis aŭ estas malplaĉa, ĝena aŭ suferiga.

Tiuj ekzemploj ne nur ekzistas inter la diversaj religioj, sed ankaŭ en unu religio estas diversaj grupoj, diversaj akoloj, kaj ne malofte unu el tiuj skoloj malaprobas la alies deklaron, la alies sintenadon. Vidu ekzemple la Tridekjaran Militon (1618-1648) inter protestantoj kaj katolikoj.

Sed mi nun menciis grandajn tiajn ekzemplojn. Ankaŭ en la simpla privata vivo oni povas trovi tiajn faktojn.

Lasu nin iri, promeni sur ia vojo, strateto, mallarĝa vojeto. Ni renkontas alian homon, sed li ne ŝatas flankeniri, cedi lokon al ni, li ne kondutas tiel, ke ni aprobu lin. Ĉu ni kontraŭstaru aŭ ne kontraŭstaru?

Aŭ en nia mondo ni agas multe per mono. Ni ŝparas aŭ ni elspezas, ni aĉetas ion multekostan, ion malmultekostan, ni konstatas monpostulojn. Ĉu ni aprobu ilin, ĉu ni kontraŭu ilin? Ĉu tiuj faktoj en la ekonomio estas aprobindaj? Eble jes, laŭ la stato, situacio de ĉiu homo. (Rigardu ankaŭ, kie ili loĝas.)

Aŭ prenu la privatan sintenon de la homoj. Ekzistas ŝtelistoj, ekzistas drinkuloj, ja ekzistas "krimuloj". Mi ne intencas tiujn problemojn pritrakti, ĉu ni laŭ nia vidpunkto jesu la ŝteladon, la drinkadon, la "kriman" sintenadon; mi nur montras tiujn faktojn, ke ni aŭ kelkaj ne aprobas tiun sintenadon kaj eble oni kapablas kontraŭstari kaj malhelpi tion. Do, eble tre malfacilaj demandoj. Sed tiaj faktoj ja ekzistas. Tia estas la mondo. Tiaj estas la homoj.

Kaj nun tiuj menciitaj faktoj sen prijuĝo pri rajteco aŭ ĝusteco, estas ne aprobitaj de kelkaj aŭ de multaj kaj en multaj kazoj estas eblo de kontraŭstaro, de malhelpo, de malebligo. - Ĉu vere tiu eblo ekzistas, restas demando, sed ofte oni tion provas.

La demando de tolerado nun estas, ĉu ni aŭ la koncerna homo kontraŭstaru pri sia neaprobo, ĉu li provu malebligi per diversaj kontraŭagoj, do eĉ ankaŭ per militoj aŭ similaj agoj, aŭ ĉu li nur restu ĉe la malaprobo kaj ne kontraŭagu, ne kontraŭstaru?

Tio estas laŭ mia opinio ege malfacila demando, aŭ simpla demando, kies respondo estas malfacilega.

Certe oni devas atenti, aŭ almenaŭ estus bone, ke oni priatentu kaj esploru la faktojn, bone konstatu, kio estas, kio okazas, ĉu vere la neaprobo ĝustas, pravas, ĉu oni vere kontraŭstaru. Kaj restas nun la respondebloj, ke oni konsentu aŭ decidu kontraŭstari kaj malhelpi, malebligi, aŭ ke oni toleru. Ĉu oni toleru tiujn malplaĉajn neaprobitaĵojn, tiujn ĝenajn aŭ suferigajn faktojn, eĉ se oni povus kontraŭstari kaj malebligi ilin?

Mi vere ne povas ĉi tie diri jes aŭ ne. Eble por mi persone mi havas ian opinion pro la spertoj, pro la travivaĵoj, pro multa aŭ ofta pripensado kaj priatentado de tiaj faktoj, eble. Sed mi povas almenaŭ diri, ke tiu demando de tolerado estu respondata de ĉiu por si mem. Mi ne povas diri jes aŭ ne kun valido por la legantoj aŭ por ĉiuj homoj. Ĉiu vere mem devas decidiĝi, ĉu li toleru aŭ ne, tutsincere por si mem. Priparolado kun aliaj aŭ legado pri tiu temo aŭ tiuj problemoj povas helpi, sed la sola aŭ fina solvo estas la propra memdecido laŭ sia priatento, esploro kaj ekkono.

Eble tio estas neplaĉa afero, ke ĉiu mem pripensu kaj direktu sian agadon, sian sintenadon, sian toleradon. Eble al kelkaj pli plaĉas, se oni ricevas kompletan solvon kaj nur agu laŭ tiu regulo aŭ ordono. Tio ne tiom streĉas la cerbon. Oni povas pli trankvile simple tion fari, kion postulas la religio, la dio, la ŝtato, la patro. Sed ĉu vere? Mi pli rekomendas mem decidi kaj ne preni simple la diron de la patro.

Tion mi pensas pri la tolerado. La temo sed estas toleremo. Do ne nur kelkfoje toleri aŭ ne toleri, sed konsideri la toleradon konsilinda, eĉ valora por sia konduto ĉi tie en la mondo, por sia vojo laŭ sia celo. Ne nur en kelkaj kazoj toleri, sed emi toleri, sin eduki al toleremo, por ke oni havu ian kutimon de tolerado, ian emon al tolerado.

Mi supozas, ke mi iom klarigis la signifon de la vorto toleremo. Ĝi certe estas grava eco de homo, aŭ eble nur de kelkaj homoj, kaj multaj homoj eble ne povas jesi tiun emon, la toleremon.

Tasko de la budhanoj ne estas doni ian regulon, kiu validu por ĉiuj, ian leĝon "vi devas" aŭ "vi ne rajtas". Budhana tasko estas atentigi la legantojn, la amikojn pri la amplekso de la demando, pri la malfacileco de la problemo, kaj iom montri la eblon solvi ĝin.

Tiu eblo ekzistas per propra pripensado de la bone atentitaj faktoj, per meditado, tio estas per la konstato, kio estas la homo, la homoj, kial estas la faktoj en la mondo, kaj per memdecidiĝo.

Ĉu toleremo estu via celo, kara leganto, tion vi mem decidu!

Bonvolu toleri mian prezenton, eĉ se ĝi ne plaĉas al vi. Kaj mi toleras vian kontraŭan opinion. Tamen mi petas, diru resp. skribu vian opinion aŭ priparolu ĝin kun viaj amikoj.

Ni toleru la diversajn opiniojn, eĉ se ni ne aprobas ilin.